WIKIPEDIA

Klimatdomo de Bremerhaven

La **Klimatdomo de Bremerhaven** ("Klimahaus Bremerhaven 8° Ost") estas scienca ekspozicidomo en Bremerhaven, Germanujo. La Klimatdomo situas ĉe Alter Hafen ("malnova haveno") kaj estas parto de Havenwelten ("Havenmondoj"). Estas pritraktata sur ensuma ekspozici-areo de ĉirkaŭ 18.800 m² ejo de sciado kaj spertado, dividita en kvar partoj pri la temaro klimato kaj klimatŝanĝiĝo. La funciiganto estas *Klimahaus-Betriebsgesellschaft.* Oni kalkulas ĉirkaŭ po 600.000 vizitantoj jare.

Vido al Havenwelten ("Havenmondoj") kun la Klimatdomo de Bremerhaven (dekstre apud la turdoma hotelo)

La Klimatdomo de Bremerhaven estis inaŭgurita la 26an de junio 2009 de la irlanda muzikisto kaj por-homrajta aktivulo Bob Geldof.[1] Ĝi estas la dua scienca ekspozicidomo en Bremerhaven aldone al *Nordsee Science Center*[2] ("Scienca ekspozidomo Norda Maro") kaj, kune kun Universum Bremen, la tria en la federacia lando Bremeno.

Enhavo

Ekspozicio
Patroneco
Konstruiginto kaj funkciiganto
Referencoj
Ligiloj

Ekspozicio

La ekspozici-areo ampleksas 11.500 m² [3] kaj estas strukturita en la kvar ekspozici-partoj *Reise* ("vojaĝo"), *Elemente* ("elementoj"), *Perspektiven* ("perspektivoj") kaj *Chancen* ("ŝancoj").

La parto *Reise* ("vojaĝo") okupas la plej grandan areon per 4.800 m². Deire de Bremerhaven ĝi kondukas laŭlonge de la oka longitudo orienta. En pluraj stacioj la vizitantoj travivu la diversajn klimato-zonojn de la tero kaj spertu, kiel la klimato kaj ĝia ŝanĝiĝo influas al la vivo de la homoj en la respektivaj lokoj: altmontara klimato en Svislando; mediteranea klimato en Sardujo; seka dezerta klimato en Niĝero; humid-varmega klimato en Kameruno; polusa klimato en Antarkto; tropika klimato en Samoo; tundra klimato en Alasko; modera oceana klimato en germana Nord-Mar-insulo.

Por vidi bildon de "Fliegende Lore" ("fluganta ne-tegita vagono") ĉe la stacio Langeneß en la parto *Reise* ("vojaĝo") klaku ĉi tie (https://upload.wikimedia.org/wikipedia/de/3/36/Fliegende_lore.jpg).

En la ekspozici-parto *Elemente* ("elementoj") la vizitantoj povas sperti, de kio klimato kaj vetero estas influataj, kiel estiĝas unuopaj fenomenoj kaj kiel interrilatiĝas la komplika tuta sistemo. Kadre de tio la vizitantoj povas mem eksperimenti per fajro, tero, akvo kaj aero kaj ekzemple estigi miniaturajn ŝtormojn aŭ

vulkanajn erupciojn. Pli ol 100 interaktivaj ekzpoziciaĵoj ilustras la fizikon de la klimato, de ĝiaj komplikaj interrilatoj kaj fenomenoj.

La *Perspektiven* ("perspektivoj") karakterizas la trian ekspozici-parton. En ĝi temas pri la klimato en pasinteco, estanteco kaj efikoj al la estonteco. Tie konoj de la klimat-esplorado estas prezentataj.

En la kvara ekzpozici-parto, la *Chancen* ("ŝancoj"), ag-ebloj estas montrataj al la vizitanto. Li do povas testi lude en temĉambroj, kiel li en la ĉiutaga vivo povas persone kontribui al la malpliigo de la elpuŝo de karbondioksido.

Ĉiu ekspozici-parto estas aranĝita tiel, ke ĝi povas esti vizitata sendepende de la aliaj.

Patroneco

Per la transpreno de la patroneco fare de la germana federacia ministro pri medio Sigmar Gabriel kaj la subteno de la projekto fare de politikistoj kaj sciencistoj evidentiĝis la soci-politika graveco de la temaro de la Klimatdomo.

Favore agas pliaj institucioj kaj entreprenoj, inter ili Alfred-Wegener-Institut für Polar- und Meeresforschung, Max-Planck-Institut für Meteorologie kaj Deutsche Wetterdienst.

Konstruiginto kaj funkciiganto

Konstruiginto

Konstruiginto estas la urbo Bremerhaven. Ĝi komisiis la taskon al la filio *Bremerhavener Entwicklungsgesellschaft Alter/Neuer Hafen* (BEAN).[4]

Laboroj ĉe la Klimatdomo (Oktobro 2008)

Funkciiganto

La Klimatdomo estas komuna projekto de la urbo Bremerhaven, federacia lando Bremeno kaj la privata funkciiganto. La ŝtato financas la profitcelajn elspezojn de 70 milionoj da eŭroj. La iniciatintoj Petri & Tiemann transprenas la funkciigadon kaj la al tio ligitan riskon. Kiel funkciiga asocio estis fondita *Klimahaus-Betriebsgesellschaft*.

Klimatdomo nokte

Referencoj

1. ↑ Bob Geldof eröffnet das Klimahaus Bremerhaven (http://klimahaus-bremerhaven.de/sites/default/files/attachments/Bob_Geldof_eroeffnet_Klimahaus_0.pdf)
2. ↑ Nordsee Science Center e. V. (http://www.nsc-bremerhaven.de)
3. ↑ Presseinfo *Eine Klimareise um die Welt...* (http://klimahaus-bremerhaven.de/sites/default/files/attachments/1._Eine_Klimareise_um_die_Welt_auf_8deg_Ost.pdf)
4. ↑ NWZonline - Beleg BEAN sowie weitere Daten (http://www.nwzonline.de/index_aktuelles_politik_hintergrund_artikel.php?id=1606376)

Ligiloj

- Klimahaus Bremerhaven 8° Ost (http://www.klimahaus-bremerhaven.de/)
- Architektur und Klimakonzept bei Constructalia (http://www.constructalia.com/de_DE/gallery/galeria_detalle.jsp?idProyec=4792436/)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Klimatdomo_de_Bremerhaven&oldid=6076564"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 17:20, 22 dec. 2016.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.